

## & Al la juda foririnto:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 248 paŝoj dum 3 minutoj. Poemon verkis Lodewijk Cornelius Deij. Per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado baladigis Martin Strid.>

### (#Melodio:

<:31> (/mi mi dore mi mimi miimido re fa;mi mimimi mimimi mimido re fa;

(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mire doTi La; So3mi mimi re do)

)×8 )+

### (&Strofoj:

'1 /Li fermis la kofron, manpremis –  
adiaŭ! ; Sen ia protesto li iris... Hodiaŭ

(×: **En la ĉen' ; Dancu nun trankvile  
; Ĉiuj ni trankvilas ; Jen en amika  
ĉen' ; Dancu nun trankvile.**)

'2 mi tion komprenas; li povis nur miri,  
; ke mi, la kristano, lin lasis foriri. ....

'3 Kun kapo klinita la kofron li portis. ;  
Li iris la vojon al Auschwitz kaj mortis  
.....

'4 sen ia protesto. Li povis nur miri, ; ke  
mi, la kristano, lin lasis foriri. ....

'5 Kaj iam la filo kun filo parolos, ; kaj  
tiu demandos, la veron li volos. ....

'6 La mia silentos... kaj povos nur miri,  
; ke mi, la kristano, lin lasis foriri. ....

'7 Ni sentis kompaton kaj monon  
kolektis, ; dum kelkaj el ni la infanojn  
protektis. ....

'8 Sed Auschwitz ekzistis! Nu, kion plu  
diri? ; Ke mi kaj ke vi... ni lin lasis  
foriri. ....)